

Annette von Droste-Hülshoff,

## Ĉe l' lageto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Jen ĉe arbara rando  
Murmuras en kviet',  
Jen ĉe picea vando  
Sin lulas la laget'.

Jen kie en sunbrilo  
La ondo kisas la  
Lagbordon, la scintilo  
De l' akvo ravas ja.

Ĉiloke fokusiĝas  
La tuta sunradi',  
Kaj tie mi sidiĝas  
Por pentri ĉion ĉi.

Senventa anguleto,  
Verdriĉa estas ĝi;  
En tiu ĉi loketo  
Sengene sidas mi.

Sur muskon elmetinte  
Mantelon mian nun  
Kaj dorse apoginte  
Min al piceo kun

Herbar' sur sino mia  
Min ravas iluzi':  
Ĉu en tagsongo ia  
Someron ludas mi?

Se grilo en herbaro  
Ne ĉirpas pro malem'  
Kaj mutas la birdaro,  
Mi kantas ion mem.

Kaj se natur' prezentas  
Malmulton nur al vi:  
Feliĉon oni sentas  
Ja vere nur en si.

...

*Traduko de la Germana poemo "Am Weiher" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-158-312 (2004-02-04 14:54:28)*